Augustin Wibbelt,

En Marto

tradukita de Manfred Retzlaff

Tuttage kaj tutnokte vent'
Nun blovas mole tra l' silent'
Super arbar' kaj kampoj.

Chu floras jam violo-flor?
Blovighas chie la odor'
Super arbar' kaj kampoj.

Kaj kvankam ne videblas flor'
Flareblas jam printem-odor'
Super arbar' kaj kampoj.

Atentu, baldau vidos vi
La tutan pompon chie chi
Super arbar' kaj kampoj.

Traduko de la Germana poemo "In'n Mäten" de Augustin Wibbelt *(∗1862-09-19 – †1947-09-14) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04).*

Arg-599-1208 (2012-09-20 15:10:41)